# Kelkaj eblaj agadoj por la "Jaro Montevideo 60"




## Kapabligo

### Individue
Partopreni en la Internacia Legoklubo de la Jaro (lanĉota en decembro).

### Loke
Prelegoj, seminarioj, kursetoj pri aspektoj de la E-kulturo kaj ĝia evoluo dum la lastaj sesdek jaroj.

### Lande
Artikoloj pri "60 jaroj de..." en revuoj, blogoj k.s.; intervjuoj kun veteranaj esperantistoj kaj nuntempaj gvidantoj pri la lastaj 60 jaroj.

### Internacie
Elsendoj de radiostacioj kaj retradioj pri similaj temoj; enketoj pri la "dek plej bonaj..." (romanoj, kantoj, lernolibroj, retejoj ktp...) el la lastaj 60 jaroj.

## Konsciigo

### Individue
Kunlabori en la verkado, tradukado kaj eldonado de multlingvaj informiloj pri Esperanto en la kunteksto de UN kaj Unesko.

### Loke
Partopreni en la gazetara kampanjo ĉirkaŭ la 100-a UK kaj per budoj/standoj en lokaj kulturfestivaloj, lingvofoiroj kaj simile, kun emfazo pri la atingoj de la lastaj sesdek jaroj. Disvolvi ĝemelurban agadon kunlige kun la Jaro.

### Lande
Informi kaj inviti Unesko-respondeculojn kaj aliajn sociajn agantojn al kulturaj/sciencaj/klerigaj aranĝoj tra la jaro. Varbi "amikojn de Esperanto".

### Internacie
Kunlabori en "esenca vikipedieto de Esperanto" por neesperantistoj – bazaj faktoj, interesaj rakontoj, ilustraj bildoj pri niaj ĉefaj atingoj el la lastaj 60 jaroj, verkitaj en Vikipedio kaj tradukitaj en multajn lingvojn.

## Komunumo

### Individue
Partopreni en internacia projekto pri edukado, scienco aŭ kulturo – ekzemple la esperantigo de elstaraj eldonaĵoj rekomendataj de Unesko.

### Loke
Kontribui al diskutoj pri la kongresa temo, prepare al la kongreso en Lillo.

### Lande
Almenaŭ unu kultura festivalo aŭ granda kultura programo: turneoj de artistoj, verkistoj, aktivuloj (datumbazo pretigata kunlabore kun TEJO k.a.).

### Internacie
En la 100-a Universala Kongreso, aparte riĉa kultura programo kun speciala atento al kino, muziko, teatro; lanĉo de novaj internaciaj projektoj.